Diservoj de vendredo vespere, en sinagogo (Minĥa kaj Maariv)

Minĥa
Psalmo 145 (Mi altigos Vin, mia Dio, ho Reĝo, Kaj mi benos Vian nomon ĉiam kaj eterne...)

בָּרוּךְ אַתָּה יְיָ
baruĥ ata adonaj (Benata Vi estas, ho Sinjoro)
בָּרוּךְ שְׁמוֹ
baruĥ ŝmo (Benata estu lia nomo)

"Sankta, Sankta, Sankta la Sinjoro Cebaot, la tuta tero estas plena de Lia gloro" (Jes, 6, 3)
קָדוֹשׁ ׀ קָדוֹשׁ קָדוֹשׁ יְהוָה צְבָאוֹת מְלֹא כָל־הָאָרֶץ כְּבוֹדוֹ׃
"kadoŝ, kadoŝ, kadoŝ adonaj cevaot melo kol - haarec kevodo"
sankta, sankta, sankta sinjoro de la legiaroj plena tuta la tero de Lia gloro

Prediko de la Granda Rabeno
Pri la sidra estos 'bemidbar', t.e. la komenco de la libro Nombroj, ĝis ĉapitro 4a, v. 20a: la popolnombrado de Israel, Israel en la dezerto, ĝia tendaro. La du sencoj de la vorto midbar: 'dezerto' kaj 'konstruvojo'

Maariv

Unua parto: akcepto de ŝabato

Psa 95 - responde ĉantata
לְכוּ נְרַנְּנָה לַיְיָ
leĥu neranana la-adonaj

Venu, ni kantu al la Eternulo;
Ni ĝoje kriu al la rifuĝejo de nia helpo.
Ni venu antaŭ Lian vizaĝon kun glorado,
Per psalmoj ni ĝoje kriu al Li.
Ĉar granda Dio estas la Eternulo
Kaj granda Reĝo super ĉiuj dioj,
Kiu havas en Sia mano la profundaĵojn de la tero,
Kaj al kiu apartenas la altaĵoj de la montoj;
Al kiu apartenas la maro, kaj Li ĝin faris,
Kaj la sekteron Liaj manoj kreis.
Venu, ni kliniĝu, ni ĵetu nin teren,
Ni genuu antaŭ la Eternulo, nia Kreinto.
Ĉar Li estas nia Dio,
Kaj ni estas la popolo de Lia paŝtejo kaj la ŝafoj de Lia mano.
Hodiaŭ, se vi aŭskultas Lian voĉon,
Ne obstinigu vian koron, kiel en Meriba,
Kiel en la tago de Masa en la dezerto,
Kiam viaj patroj Min incitis,
Esploris kaj vidis Mian faron.
Kvardek jarojn Mi indignis kontraŭ tiu generacio,
Kaj Mi diris: Ili estas popolo kun koro malĝusta,
Kaj ili ne volas koni Miajn vojojn;
Tial Mi ĵuris en Mia kolero,
Ke ili ne venos en Mian ripozejon.

Psa 96 - responde ĉantata
שִׁירוּ לַיְיָ שִׁיר חָדָשׁ
ŝiru la-adonaj ŝir ĥadaŝ

Kantu al la Eternulo novan kanton;
Kantu al la Eternulo la tuta tero.
Kantu al la Eternulo, gloru Lian nomon,
Proklamu de tago al tago Lian savon.
Rakontu inter la popoloj Lian gloron,
Inter ĉiuj gentoj Liajn miraklojn.
Ĉar la Eternulo estas granda kaj tre glorinda,
Li estas timinda pli ol ĉiuj dioj.
Ĉar ĉiuj dioj de la popoloj estas nur idoloj;
Sed la Eternulo kreis la ĉielon.
Gloro kaj majesto estas antaŭ Li,
Forto kaj beleco estas en Lia sanktejo.
Tributu al la Eternulo, familioj de la popoloj;
Tributu al la Eternulo gloron kaj potencon.
Tributu al la Eternulo la honoron de Lia nomo;
Alportu donacon kaj venu en Liajn kortojn.
Kliniĝu al la Eternulo en sankta ornamo;
Tremu antaŭ Li la tuta tero.
Diru inter la popoloj: La Eternulo reĝas,
Kaj fortikigita estas la mondo, ke ĝi ne ŝanceliĝu;
Li juĝas la popolojn en justeco.
Ĝoju la ĉielo, kaj estu gaja la tero,
Bruu la maro, kaj ĉio, kio ĝin plenigas.
Ĝoju la kampo, kaj ĉio, kio estas sur ĝi;
Tiam kantu ĉiuj arboj de la arbaro
Antaŭ la Eternulo, ĉar Li venas,
Ĉar Li venas, por juĝi la teron;
Li juĝos la mondon kun justeco
Kaj la popolojn kun Sia fideleco.

Psa 97 - responde ĉantata
יְיָ מָלָךְ תָּגֵל הָאָרֶץ
adonaj malaĥ tagel haarec

La Eternulo reĝas; ĝoju la tero;
Estu gajaj la multaj insuloj.
Nubo kaj mallumo estas ĉirkaŭ Li;
Vero kaj justeco estas la fundamento de Lia trono.
Fajro iras antaŭ Li,
Kaj bruligas ĉirkaŭe Liajn malamikojn.
Liaj fulmoj lumigas la mondon;
La tero vidas, kaj tremas.
Montoj fandiĝas kiel vakso antaŭ la vizaĝo de la Eternulo,
Antaŭ la vizaĝo de la Sinjoro de la tuta tero.
La ĉielo rakontas Lian veron,
Kaj ĉiuj popoloj vidas Lian gloron.
Hontiĝu ĉiuj, kiuj servas al idoloj,
Kiuj laŭdas sin pro diaĉoj.
Kliniĝu antaŭ Li ĉiuj dioj.
Aŭdis kaj ekĝojis Cion,
Kaj ektriumfis la filinoj de Jehuda
Pro Viaj juĝoj, ho Eternulo.
Ĉar Vi, ho Eternulo, estas Plejalta super la tuta tero,

Vi tre alte leviĝis super ĉiuj dioj.
Amantoj de la Eternulo, malamu malbonon.
Li gardas la animojn de Siaj fideluloj;
Li savos ilin de la mano de malvirtuloj.
Lumo verŝiĝas sur virtulon,
Kaj ĝojo sur purkorulojn.
Ĝoju, virtuloj, pro la Eternulo,
Kaj gloru Lian sanktan nomon.

Psa 98 - responde ĉantata
מִזְמ֡וֹר שִׁ֤ירוּ לַיְיָ ׀ שִׁ֣יר חָ֭דָשׁ
mizmor - ŝir ladonaj ŝir ĥadaŝ

Psalmo.
Kantu al la Eternulo novan kanton,
Ĉar miraklojn Li faris;
Helpis Lin Lia dekstra mano kaj Lia sankta brako.
La Eternulo aperigis Sian savon;
Antaŭ la okuloj de la popoloj Li malkaŝis Sian justecon.
Li memoras Sian bonecon kaj Sian fidelecon al la domo de Izrael.
Vidis ĉiuj finoj de la tero la helpon de nia Dio.
Ĝoje kriu al la Eternulo la tuta tero;
Kantu, gloru, kaj muziku.
Muziku al la Eternulo per harpo,
Per harpo kaj per sonoj de psalmo.
Per trumpetoj kaj per sono de korno
Ĝoje kriu antaŭ la Reĝo, la Eternulo.
Bruu la maro, kaj ĉio, kio ĝin plenigas,
La mondo kaj ĝiaj loĝantoj.
La riveroj plaŭdu per la manoj,
La montoj kune kantu ĝoje,
Antaŭ la Eternulo, ĉar Li venas, por juĝi la teron;
Li juĝos la mondon kun justeco kaj la popolojn kun vereco.

Psa 99 - responde ĉantata
יְיָ מָלָךְ
adonaj malaĥ

La Eternulo reĝas, tremas la popoloj;
Li sidas sur keruboj, ŝanceliĝas la tero.
La Eternulo estas granda en Cion,
Kaj Li estas alte super ĉiuj popoloj.
Oni gloru Vian grandan kaj timindan nomon:
Li estas sankta.
Kaj la forton de la reĝo, kiu amas justecon,
Vi fortikigis en praveco;
Juĝon kaj justecon en Jakob Vi aranĝis.
Altigu la Eternulon, nian Dion,
Kaj kliniĝu antaŭ la benketo de Liaj piedoj:
Li estas sankta.
Moseo kaj Aaron estas inter Liaj pastroj,
Kaj Samuel estas inter tiuj, kiuj vokas Lian nomon;
Ili vokis al la Eternulo, kaj Li ilin aŭskultis.
El nuba kolono Li parolis al ili;
Ili observis Liajn regulojn, kaj la leĝon, kiun Li donis al ili.
Ho Eternulo, nia Dio, Vi ilin aŭskultis;
Vi estis por ili Dio pardonanta, kvankam venĝanto por iliaj faroj.
Altigu la Eternulon, nian Dion,
Kaj kliniĝu antaŭ Lia sankta monto;
Ĉar sankta estas la Eternulo, nia Dio.

Psa 29 - tute kantata
מִזְמ֗וֹר לְדָ֫וִ֥ד הָב֣וּ לַ֭יְיָ בְּנֵ֣י אֵלִ֑ים

mizmor ledavid   havu la-adonaj bene elim
Psalmo de David   Tributu al la Eternulo, vi potenculoj,
havu la-adonaj kavod va'oz
Tributu al la Eternulo honoron kaj forton.

havu la-adonaj kevod ŝemo
Tributu al la Eternulo la honoron de Lia nomo;
hiŝtaĥavu la-adonaj behadrath kodeŝ
Kliniĝu antaŭ la Eternulo en sankta ornamo.

kol adonaj 'al-hamaim
La voĉo de la Eternulo iras super la akvoj;
el-hakavod hir'im
La Dio de gloro tondras,
adonaj 'al-maim rabim
La Eternulo super grandaj akvoj.

kol adonaj bakoaĥ
La voĉo de la Eternulo iras kun forto,
kol adonaj behadar
La voĉo de la Eternulo iras kun majesto.

kol adonaj ŝover arazim
La voĉo de la Eternulo rompas cedrojn,
veiŝaber adonaj eth-arzej halevanon
La Eternulo rompas la cedrojn de Lebanon.

vajarkidem kemo-egel
Li saltigas ilin kiel bovidon,
levanon vesirjon kemo ben-reemim
Lebanonon kaj Sirjonon kiel bubalidon.

kol adonaj ĥocev lehavoth eŝ
La voĉo de la Eternulo elhakas fajran flamon.
kol adonaj jaĥil midbar
La voĉo de la Eternulo skuas dezerton,

jaĥil adonaj midbar kadeŝ
La Eternulo skuas la dezerton Kadeŝ.
kol adonaj jeĥolel ajaloth vejeĥesef je'aroth
La voĉo de la Eternulo igas cervinojn naski, kaj nudigas arbarojn;
uvhejkalo kulo omer kavod
Kaj en Lia templo ĉio parolas pri Lia gloro.

adonaj lemabul jaŝav
La Eternulo regis en la tempo de la diluvo,
vajeŝev adonaj meleĥ le'olam
La Eternulo restos Reĝo eterne.

adonaj 'oz le'amo jiten
La Eternulo donos forton al Sia popolo,
adonaj jevareĥ eth-'amo vaŝalom
La Eternulo benos Sian popolon per paco.

Leĥa dodi
refreno:
leĥa dodi likrath kala
Venu, amata, renkonte al via fianĉino
pene ŝabat nekabela
venas ŝabato ni iru akcepti ŝin

Psa 92 - ĉiu silente ĝis 'cadik katamar' (Virtulo verdestas)
מִזְמ֥וֹר שִׁ֗יר לְי֣וֹם הַשַּׁבָּֽת
mizmor ŝir lajom haŝabat

Psalmo-kanto por la tago sabata.
Bone estas glori la Eternulon
Kaj prikanti Vian nomon, ho Plejaltulo;
Rakonti matene pri Via boneco
Kaj nokte pri Via fideleco,
Sur dekkorda instrumento kaj sur psaltero,
Per solenaj sonoj de harpo.
Ĉar Vi ĝojigis min, ho Eternulo, per Viaj agoj;
La farojn de Viaj manoj mi prikantos.
Kiel grandaj estas Viaj faroj, ho Eternulo!
Tre profundaj estas Viaj pensoj.
Malklerulo ne scias,
Kaj malsaĝulo tion ne komprenas.
Kiam malvirtuloj verdestas kiel herbo
Kaj ĉiuj malbonaguloj floras,
Tio kondukas al ilia ekstermiĝo por eterne.
Kaj Vi estas alta eterne, ho Eternulo.
Ĉar jen Viaj malamikoj, ho Eternulo,
Jen Viaj malamikoj pereas,
Diskuras ĉiuj malbonaguloj.
Sed mian kornon Vi altigas kiel la kornon de bubalo;
Mi estas oleita per freŝa oleo.
Kaj mia okulo rigardas miajn malamikojn;
Pri la malbonaguloj, miaj kontraŭuloj, aŭdas miaj oreloj.
Virtulo verdestas, kiel palmo,
Staras alte, kiel cedro sur Lebanon.
Plantitaj en la domo de la Eternulo,
Ili verdestas en la kortoj de nia Dio.
Ili floras ankoraŭ en la maljuneco,
Estas sukplenaj kaj freŝaj,
Por sciigi, ke la Eternulo estas justa,
Mia fortikaĵo, kaj ne ekzistas en Li maljusteco.

Psa 93 - ĉantata kune

La Eternulo reĝas; Li estas vestita de majesto;
La Eternulo estas vestita kaj zonita de potenco;
Kaj fortikigita estas la mondo, ke ĝi ne ŝanceliĝu.
De antikve estas fortika Via trono;
Vi estas de eterne.
Levas la riveroj, ho Eternulo, levas la riveroj sian voĉon,
Levas la riveroj sian bruon;
Pli ol la bruo de multego da akvo,
Ol la potencaj ondoj de la maro,
Potenca estas la Eternulo en la altaĵo.
Viaj leĝoj estas tre fidindaj;
Via domo estas ornamita de sankteco,
Ho Eternulo, por eterne.

Kadiŝ de la orfoj

Dua parto de la diservo : ŝma
Solena enkonduko
ĥazan
בָּרְכוּ אֶת־יְיָ הַמְבֹרָךְ
baraĥu eth adonaj hamvoraĥ
Benu la Sinjoron, inda esti benata

asembleo
בָּרוּךְ יְיָ הַמְבֹרָךְ לְעוֹלָם וָעֶד
baruĥ adonaj hamvorah le'olam va'ed
Benata estu la Sinjoro por ĉiam kaj eterne

[sekvas ampleksigo de tiu laŭdo-preĝo, kiu enkondukas la plej gravan preĝon de Israel]

Rea 6, 4-9
שְׁמַע יִשְׂרָאֵל יְיָ אֱלֹהֵינוּ יְיָ ׀ אֶחָד
ŝma israel adonaj elohejnu adonaj eĥad
Aŭskultu, ho Izrael! la Eternulo, nia Dio, la Eternulo estas unu sola.
Kaj amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta forto. Kaj ĉi tiuj vortoj, kiujn mi ordonas al vi hodiaŭ, estu en via koro; kaj ripetadu ilin al viaj infanoj, kaj parolu pri ili, kiam vi sidas en via domo kaj kiam vi iras sur vojo kaj kiam vi kuŝiĝas kaj kiam vi leviĝas; kaj alligu ilin kiel signon al via mano, kaj ili estu kiel memorigaĵo inter viaj okuloj; kaj skribu ilin sur la fostoj de via domo kaj sur viaj pordegoj.

Rea 11, 13-21
Kaj se vi obeos Miajn ordonojn, kiujn Mi ordonas al vi hodiaŭ, amante la Eternulon, vian Dion, kaj servante al Li per via tuta koro kaj per via tuta animo: tiam Mi donos al via lando pluvon ĝiatempe, fruan kaj malfruan; kaj vi kolektos vian grenon kaj vian moston kaj vian oleon. Kaj Mi donos herbon sur via kampo por via bruto; kaj vi manĝos kaj estos sata. Gardu vin, ke ne forlogiĝu via koro, kaj ke vi ne forflankiĝu, kaj ke vi ne servu al aliaj dioj kaj ne kliniĝu antaŭ ili. Alie ekflamos kontraŭ vi la kolero de la Eternulo, kaj Li ŝlosos la ĉielon, kaj ne estos pluvo, kaj la tero ne donos siajn produktaĵojn, kaj vi rapide forpereos el la bona lando, kiun la Eternulo donas al vi. Metu do ĉi tiujn miajn vortojn en vian koron kaj en vian animon, kaj alligu ilin kiel signon al via mano, kaj ili estu kiel memorigaĵo inter viaj okuloj.

Kaj instruu ilin al viaj filoj, parolante pri ili, kiam vi sidos en via domo kaj kiam vi iros sur la vojo kaj kiam vi kuŝiĝos kaj kiam vi leviĝos; kaj skribu ilin sur la fostoj de via domo kaj sur viaj pordegoj; por ke longiĝu via vivo kaj la vivo de viaj infanoj sur la tero, pri kiu la Eternulo ĵuris al viaj patroj, ke Li donos ĝin al ili, kiel longe estas la ĉielo super la tero.

Nom 15, 37-41

Kaj la Eternulo diris al Moseo jene: Parolu al la Izraelidoj, kaj diru al ili, ke ili faru al si kvastojn sur la randoj de siaj vestoj en siaj generacioj, kaj ili enmetu en la kvaston de la rando fadenon bluan. Kaj ĝi estu por vi kvasto, kiun rigardante, vi rememoros ĉiujn ordonojn de la Eternulo kaj plenumos ilin kaj ne iros laŭ viaj koroj kaj viaj okuloj, kiujn vi malĉaste sekvadas; por ke vi memoru kaj plenumu ĉiujn Miajn ordonojn kaj estu sanktaj antaŭ via Dio. Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, por ke Mi estu via Dio. Mi estas la Eternulo, via Dio.

[ne–biblia teksto reprenanta la temojn ĉisuprajn, ĝenerale legata silente]

Eli 15, 11

מִֽי־כָמֹ֤כָה בָּֽאֵלִם֙, יְיָ, מִ֥י כָּמֹ֖כָה נֶאְדָּ֣ר בַּקֹּ֑דֶשׁ, נוֹרָ֥א תְהִלֹּ֖ת עֹ֥שֵׂה פֶֽלֶא:

mi khamokha baelim, adonaj, mi khamokha needar bakodeŝ, nora thehiloth 'ose fele

Kiu estas kiel Vi inter la dioj, ho Sinjoro? Kiu estas kiel Vi, majesta en sankteco, Timinda kaj laŭdinda, faranta miraklojn?

[ĥazan respondas per alia versiklo kaj la asembleo finas per:]

Eli 15, 18

יְיָ יִמְלֹךְ לְעוֹלָם וָעֶד

adonaj jimloĥ le'olam va'ed

La Eternulo reĝos ĉiam kaj eterne.

[sekvas propetoj]

Eli 31, 16-17

Kaj la Izraelidoj observu la sabaton, por fari la sabaton en siaj generacioj eterna interligo. Inter Mi kaj la Izraelidoj ĝi estu signo por ĉiam; ĉar dum ses tagoj la Eternulo faris la ĉielon kaj la teron, sed en la sepa tago Li ĉesis kaj ripozis.

Tria parto de la diservo: 'amida

Tiu benoj (benata estu Vi, o Sinjoro) estas plej parte preĝata silente. Ĝia fina parto estas repreno: oni kunlegas au kunĉantas ĝin.

Fino de la diservo: kiduŝ

La diservo finiĝas per kiduŝ, t.e. 'sanktigo' de la vino (kiun oni kantu precipe hejme, ĉiu vendrede vespere).

בָּרוּךְ אַתָּה יְיָ אֱלֹהֵינוּ מֶלֶךְ הָעוֹלָם בּוֹרֵא פְּרִי הַגָּפֶן

baruĥ ata adonaj elohejnu meleĥ ha'olam bore peri hagafen

Benata vi estu, Sinjoro, nia Dio, reĝo de l'universo kiu kreis la frukton de la vito